

### Veranstaltungshinweise

Unsere Esp.-Lernrunden für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen (Stufe A2<sup>1)</sup>): Mi. 18:30-20:00 Uhr, Gemeindehaus der kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1<sup>1)</sup>): Do. 19:45-21:15 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – **Monatl. Vereinstreffen** (alle in 2010 u. um 19:30 Uhr in den genannten Gaststätten): **24.06.:** *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen; **15.07.:** *Müggenkrug*, Elsflether Str. 52, 26125 Oldenburg; **19.08.:** *Panorama*, An der Kaje 1B, 26931 Elsfleth; **16.09.:** *Weserterrassen*, Strandallee 10, 26954 Nordenham; **14.10.:** *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen; **18.11.:** *Müggenkrug*, Elsflether Str. 52, 26125 Oldenburg. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen o. bei Alke Geveke, Tel.: 0177-1755475, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

17.-23.07.2010	Internacia Esperanto-Konferenco, Herzberg
17.-24.07.2010	95. Esperanto-Weltkongress, Havanna, Kuba
23.07.-06.08.2010	8-a SOMERE, Jünkerath
06.-13.08.2010	Internacia Kongreso, Straßburg, Frankreich
21.-28.08.2010	77. Italienischer Esp.-Kongress, Lignano Sabbiadoro, Italien

<sup>1)</sup>Erläuterung d. Stufen: [http://www.europass.cedefop.europa.eu/img/dynamic/c1349/type.FileContent.file/ELPEexamples\\_de\\_DE.pdf](http://www.europass.cedefop.europa.eu/img/dynamic/c1349/type.FileContent.file/ELPEexamples_de_DE.pdf), S. 2; auf Esp.: <http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#691>

Ni estis petitaj atentigi pri la **4-a Internacia Konkurso** – jaro 2010 – pri *Kristnaska Poezio* por geknaboj de 6 ĝis 14 jaroj; limdato por kontribuajtoj: 15-a de Novembro 2010. La konkurso estas lanĉita de Triesta Esperanto-Asocio, Via del Coroneo 15, 34133 Trieste, Italujo. Pli da informoj: <http://xa.yimg.com/kq/groups/2479191/1333816569/name/Regularo>.

### Impressum:

**Zeitschrift:** Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)  
**Erscheinungsweise:** dreimal jährlich als Druckausgabe und elektronische Ausgabe, Netzseite:  
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

**Herausgeber:** Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.  
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

**Information und Redaktion:** Anne Höpken, Schulstr. 13a,  
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837  
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368  
Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044  
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

**Bankverbindung**  
**(für Beiträge und Spenden):** Raiffeisenbank Oldenburg eG  
BLZ 28060228  
Kontonummer 1200160000  
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

# Esperanto Gazeto

N-ro 28

ISSN 1861-3330

Jun. – Sep. 2010

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



**Kaiserslautern, 22.05.2010:** Mitglieder unseres Vereins beim Nationalen Französischen Esperanto-Kongress und 87. Deutschen Esperanto-Kongress

**Kaiserslautern, 22-a de Majo 2010:** Membroj de nia klubo ĉe la Nacia Franca Esperanto-Kongreso kaj 87-a Germana Esperanto-Kongreso (Foto: Schubert)

**Printempa Revido de EMAS  
(Nienburg/Weser, 8-a de Marto 2010)**

La inviton de EMAS (Esperanto-Ligo de Malsupra Saksujo) sekvis ĉirkaŭ dek kvin esperantistoj, ĉefe



*Gvidata ekskurso tra Nienburg/Weser / Stadtführung durch Nienburg/Weser; Foto: Beckmann*

el Malsupra Saksujo kaj Bremeno. Zsófia Kóródy faris prelegon pri la familio de Zamenhof (1859-1917), iniciatinto de Esperanto, kaj virinoj en la frua tempo de la Esperanto-movado. Ŝi montris interesajn bildkartojn kaj fotojn. Peter Zilvar prezentis la Esperanto-aktivadon en Herzberg – *la Esperanto-urbo*. Libroj kaj brokantaĵoj estis ofertataj sur librotablo. La gvidata ekskurso tra la urbo okazis en tre malvarma, sed suna vetero; jen vidindaĵoj: la vitrofabriko, asparago-

skulptaĵo, bazaro, preĝejo, urbdomo, ponto trans Vezeron kaj krome statuoj de Widukind kaj Karolo la Granda. – Andreas

**Frühlings-Wiedersehen von EMAS  
(Nienburg/Weser, 08.03.2010)**

Der Einladung von EMAS (Esperanto-Bund von Niedersachsen) folgten etwa fünfzehn Esperantisten, hauptsächlich aus Niedersachsen und Bremen. Zsófia Kóródy hielt einen Vortrag über die Familie Zamenhofs (1859-1917), dem Initiator des Esperanto, und Frauen in der Frühzeit der Esperanto-Bewegung. Zsófia zeigte interessante Ansichtskarten und Fotos. Peter Zilvar stellte die Esperanto-Aktivität in Herzberg – *die Esperanto-Stadt* vor. Bücher und Altwaren wurden auf einem Büchertisch angeboten. Die Stadtführung erfolgte bei sehr kaltem, aber sonnigem Wetter; hier Sehenswürdigkeiten: die Glasfabrik, die Spargel-Skulptur, der Markt, die Kirche, das Rathaus, die Brücke über die Weser sowie die Statuen von Widukind und Karl dem Großen. – Andreas

## Enigmo

Kiu konstanta nombro rezultas, se kun iu ajn kvarcifera nombro, ĉe kiu ne ĉiuj ciferoj estas la samaj (ekz. 3521), oni procedas laŭ la sekvaj paŝoj 1 kaj 2?

- 1) Oni ordigu la ciferojn laŭ falanta granda (ĉe la supra ekzemplo: 5321) kaj laŭ kreskanta granda (ĉe la supra ekzemplo: 1235) kaj subtrahu ĉi lastan disde la antaŭa (do 5321 minus 1235 ĉe la supra ekzemplo).
- 2) Al la diferenco oni apliku paŝon 1 tiel ofte, ĝis la diferenco ne plu ŝanĝigas.

Prie estis cetere prelego dum la kongresoj en Kaiserslautern.



*Kaiserslautern: beim Kaiserbrunnen / ĉe Kaiserbrunnen*



*Kaiserslautern: vorm Altstadt hotel / antaŭ Altstadt hotel*

### Das Hexen-Einmaleins

Du musst verstehn!  
Aus Eins mach Zehn,  
Und Zwei lass gehn,  
Und Drei mach gleich,  
So bist du reich.  
Verlier die Vier!  
Aus Fünf und Sechs,  
So sagt die Hex',  
Mach Sieben und Acht,  
So ist's vollbracht:  
Und Neun ist Eins,  
Und Zehn ist keins.  
Das ist das Hexen-Einmaleins!

Johann Wolfgang von Goethe (1749-1832)

### La sorchistin-multobligtabel'

Tion komprenu!  
Dek faru el unu,  
Kaj du foriri lasu,  
Kaj egaligu tri,  
Tiel richas vi.  
Al perditar' metu kvar!  
El kvin kaj ses,  
Diras la sorchistin', jes,  
Faru sep kaj ok, jen,  
Tiel ighis je plen':  
Kaj nau estas unu,  
Kaj dek estas neniu.

La sorchistin-multobligtabel' estas chi tiu!

(el la germana esperantigis Andreas)

**Gruppenabend der Esperanto-Gruppe Bremen:  
Andreas trägt über sein Dissertationsthema vor  
(Bremen, 17.03.2010)**

Auf Einladung der Esperanto-Gruppe Bremen hielt Andreas einen Vortrag über sein Dissertationsthema „Quantitative Studien zum Esperanto unter besonderer Berücksichtigung der Wortbekanntheit“ (Doktorvater: Professor Dr. Reinhard Köhler, Universität Trier). Einführend veranschaulichte Andreas anhand eines Beispiels, was *quantitative Sprachwissenschaft* ist: Angenommen, man möge erraten, welches der beiden indonesischen Wörter *dan* und *kewarganegaraan* wohl *Staatsangehörigkeit* und welches *und* heißt. Die Anwesenden fanden richtig heraus: *dan* bedeutet *und*. In allen Sprachen gilt das „Sprach-Naturgesetz“, dass die häufigeren Wörter im Durchschnitt die kürzeren sind. Ein weiteres Phänomen ist, dass kürzere Wörter tendenziell mehr Bedeutungen haben (z. B. hat das zweisilbige *verda*, *grün*, sieben Bedeutungen; das viersilbige *meleagro*, *Truthahn*, nur eine). Die häufigsten Wörter im Esperanto sind *la* (*der/die/das*), gefolgt von *de* (*von*; etwa halb so oft wie *la*), *kaj* (*und*; etwa ein Drittel so oft wie *la*) und *en* (*in*; etwa ein Viertel so oft wie *la*), wobei die genannten Brüche ein weiteres Sprachgesetz andeuten ... Außerdem: Die Häufigkeiten der 28 bedeutungsunterscheidenden Laute des Esperanto (sie werden ja durch seine 28 Buchstaben eins zu eins verschriftet) folgen einer ganz bestimmten mathematischen Funktion, was analog auch für andere Sprachen gilt. Bemerkenswert ist, dass man z. B. nicht von *quantitativer Astronomie* spricht, sondern nur von *Astronomie*. Der Grund ist, dass es anders als in der Sprachwissenschaft in der Astronomie selbstverständlich ist, Mathematik einzusetzen, und man das daher nicht durch das Beiwort *quantitativ* hervorheben muss. Der Schwerpunkt von Andreas' Dissertation liegt in der Untersuchung der Bekanntheit von Wörtern des Esperanto bei dessen Sprechern in Abhängigkeit von der Worthäufigkeit, genau genommen bei solchen Sprecher, die ihr eigenes Esperanto-Anwendungsvermögen als gut einschätzen: Für diese Untersuchung übertrug Andreas einen mathematisch-statistischen Ansatz aus der Prüfverfahrensentwicklung auf die Sprachwissenschaft – ein Novum. Im Ergebnis zeigt sich, dass solche Sprecher, die sich selbst sicher in ihrer Esperanto-Anwendung fühlen, diejenigen Wörter zuverlässig beherrschen, deren Häufigkeit 3 (und größer) auf einer Skala von 1 (seltene Wörter) bis 9 (häufigste Wörter) liegt. Dabei ist es unerheblich, welcher Sprachfamilie die Muttersprache angehört. Also: Chinesische Esperantisten beherrschen die Esperanto-Wörter genauso gut wie französische Esperantisten. Aber wie gesagt: Das gilt nur für die selbstsicheren Esperanto-Anwender! Für alle Anwender (also auch die Zweifler) dagegen gilt (und das fand Andreas mit der gleichen Rechenmethode heraus): Das eigene Esperanto-Anwendungsvermögen wird – statistisch gesehen – selbst nach 100 Lernjahren auf nur 73% geschätzt. Die Esperantistenschaft sieht sich also gewissermaßen als eine Gruppe „ewig Lernender“. Und das betrachteten die Anwesenden als ein durchaus positives Ergebnis. – Andreas

**Grupvespero de la Esperanto-grupo de Bremeno:  
Andreas prelegas pri sia disertacia temo  
(Bremeno, 17-a de Marto 2010)**

Post invito de la Esperanto-grupo de Bremeno Andreas faris prelegon pri sia disertacia temo „Kvantaj studoj pri Esperanto kun speciala konsidero de la vortkonateco“ (doktorpatro: profesoro d-ro Reinhard Köhler, universitato de Trier). Enkonduke Andreas ilustris per ekzemplo, kio *kvanta lingvoscienco* estas: Supoze ke oni divenu, kiu el la du indoneziaj vortoj *dan* kaj *kewarganegaraan* kredeble signifas je *ŝtataneco* kaj kiu signifas je *kaj*. La ĉeestantoj ĝuste eltrovis: *dan* signifas je *kaj*. En ĉiuj lingvoj validas la „lingvo-naturleĝo“, ke la pli oftaj vortoj meznombro estas la pli mallongaj. Plia fenomeno estas, ke pli mallongaj vortoj tendence havas pli da signifoj (ekz. la kvarsilaba *verda* havas sep signifojn; la kvarsilaba *meleagro* havas nur unu). La plej oftaj vortoj en Esperanto estas *la*, sekvata de *de* (proksimume duoble pli malofta ol *la*), *kaj* (proksimume trioble pli malofta ol *la*) kaj *en* (proksimume kvaroble pli malofta ol *la*), ĉe kio la diritaj obloj aludas al plia lingvoleĝo ... Krome: La oftecoj de la 28 sencdistingaj sonoj de Esperanto (ili ja estas skribataj unu je unu per ĝiaj 28 literoj) sekvas difinitan matematikan funkcion, kio analoge validas ankaŭ por aliaj lingvoj. Estas rimarkinde, ke oni ne parolas ekz. pri *kvanta astronomio*, sed nur pri *astronomio*. La kialo estas, ke alie ol en la lingvoscienco en la astronomio estas memkomprenebla tio, uzi matematikon, kaj oni ne bezonas emfazi tion per la epiteto *kvanta*. La fokuso de la disertacio de Andreas estas la esplorado de la konateco de la vortoj de Esperanto ĉe ties parolantoj depende de la vortofteco, pli precize ĉe tiaj parolantoj, kiuj taksas sian propran Esperanto-aplikpovon kiel bonan: Por tiu ĉi esplorado Andreas transigis matematikan-statistikan deirformulon el la evoluigado de kontrolmetodoj al la lingvoscienco – novo. Rezulte montriĝas, ke tiaj parolantoj, kiuj sentas sin mem aplombaj en sia Esperanto-aplikado, fidine posedas tiujn vortojn, kies ofteco estas 3 (kaj pli granda) en skalo de 1 (maloftaj vortoj) ĝis 9 (plej oftaj vortoj). Ĉe tio ne gravas, al kiu lingvofamilio apartenas la gepatra lingvo. Do: Ĉinaj esperantistoj posedas la Esperanto-vortojn same bone, kiel francaj esperantistoj. Sed kiel dirite: Tio validas nur por la aplombaj Esperanto-aplikantoj! Por ĉiuj aplikantoj (do ankaŭ por la dubantoj) tamen validas (kaj tion eltrovis Andreas per la sama kalkulmetodo): La propra Esperanto-aplikpovo estas taksata – laŭ statistika vidpunkto – eĉ post 100 lernjaroj je nur 73%. La esperantistaro do vidas sin kvazaŭe kiel aron de „eternaj lernantoj“. Kaj tion ĉi la ĉeestantoj rigardis kiel nepre pozitivan rezulton. – Andreas

**Nationaler Französischer Esperanto-Kongress  
und  
87. Deutscher Esperanto-Kongress  
(Kaiserslautern, 21.-24.05.2010)**

Von unserem Verein nahmen Alke, Anke, Anne, Günther, Andreas und Thomas teil; Kongressthema: „Die Pfalz zwischen Frankreich und Deutschland“. Neue Esperantisten vor Ort leisteten gemeinsam mit Monika Finnegan-Reuß (vom Deutschen Esperanto-Bund) und französischen „Kollegen“ sehr gute Organisationsarbeit. Die Örtlichkeit (Kongressgebäude in der Innenstadt) war sehr gut gewählt. Passend zum Stadtnamen herrschte sonniges, warmes „Kaiserwetter“ – perfekt für Ausflüge und Stadtbesichtigungen. Das Unterhaltungsprogramm beinhaltete Folklore-Musik von der niederländischen Gruppe *Kaprio!* und den Gesang des Chors *Koruso Interkant'*. Hier interessante Themen und Neuigkeiten:

*Europa-Hymne*: Schon seit langem hat die EU eine Hymne – ohne Text. Die Europäische Esperanto-Union (EEU) schlägt einen Esperanto-Text vor und will für dessen Offizialisierung ausreichend Unterstützungsunterschriften sammeln. Weiterhin: Nach Meinung eines EEU-Repräsentanten wird der Vorschlag, Esperanto in Schulen einzuführen, nur dann wohlwollend von Nicht-Esperantisten betrachtet, wenn das als Vorbereitung zum Unterrichten weiterer Fremdsprachen erfolgt.

*EDE und „Unu Mondo“*: Neben der EDE (*Europa – Demokratie – Esperanto*) bildete sich vor kurzem eine weitere politische Vereinigung mit Bezug zu Esperanto: „Unu Mondo“ („Eine Welt“). Ihr Mitinitiator und EDE-Mitglied, Dr. Ulrich Matthias, stellte Inhalte und Ideen vor. Allerdings wurde der Sinn einer „zweiten Esperanto-Partei“ von den meisten Anwesenden sehr bezweifelt ...

*Esperanto aktuell*: Es gibt Ideen, die Zeitschrift des Deutschen Esperanto-Bundes künftig völlig neu zu gestalten, umzubenennen und zu einer gemeinsamen Zeitschrift einiger nationaler Esperanto-Verbände (einschließlich des deutschen) werden zu lassen. Ziel: eine bessere Zeitschrift mit weniger Kosten.

*Deutscher Esperanto-Bund (GEA) und Landesverbände*: Die Jahreshauptversammlung beschloss eine Erhöhung des Mitgliedsbeitrags. Weiterhin: Einige Landesverbände bringen keine eigenen Mitteilungsblätter mehr heraus, sondern lassen ihre Informationen in *Esperanto aktuell* erscheinen. Es wurde vorgeschlagen (ohne zu Ende diskutiert zu werden), einzelne Landesverbände zusammenzuschließen, damit Verwaltungsaufwand eingespart werden kann. – Andreas

**Nacia Franca Esperanto-Kongreso  
kaj  
87-a Germana Esperanto-Kongreso  
(Kaiserslautern, 21-a ĝis -24-a de Majo 2010)**

El nia klubo partoprenis Alke, Anke, Anne, Günther, Andreas kaj Thomas; kongrestemo: „Palatinato inter Francujo kaj Germanujo“. Novaj surlokaj esperantistoj faris kune kun Monika Finnegan-Reuß (de Germana Esperanto-Asocio) kaj francaj „kolegoj“ tre bonan organizlaboron. La loko (kongresejo en la urbcentro) estis bone elektita. Konvene al la urbnomo regis suna, varma „Kaiserwetter“ (imperiestra vetero) – perfekta por ekskursoj kaj vizitoj de la urbo. La distra programo entenis folklormuzikon de la nederlanda grupo *Kaprio!* kaj la kantadon de la ĥoro *Koruso Interkant'*. Jen interesaj temoj kaj novaĵoj:

*Eŭropo-himno*: Jam de longe EU havas himnon – sen teksto. Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) proponas Esperanto-tekston kaj volas por ties oficialigo kolekti sufiĉajn subtenuskribojn. Plue: Laŭ opinio de EEU-representanto la propono, enkonduki Esperanton en lernejojn, estas konsiderata nur tiam bonvole de ne-esperantistoj, se tio okazas kiel preparo por la instruado de pliaj fremdlingvoj.

*EDE kaj „Unu Mondo“*: Apud EDE (*Eŭropo – Demokratio – Esperanto*) formiĝis antaŭ nelonge plia politika asocio kun rilato al Esperanto: „Unu Mondo“. Ĝia kun-iniciatinto kaj EDE-membro, D-ro Ulrich Matthias, prezentis enhavaĵojn kaj ideojn. Tamen la senco de „dua Esperanto-partio“ estis tre pridubita de la plej multaj ĉeestantoj ...



*Esperanto aktuell*: Estas ideoj, estontece la gazeton de Germana Esperanto-Asocio plene novformi, novnomi kaj igi komuna gazeto de kelkaj naciaj Esperanto-asocioj (inkluzive la germanan). Celo: pli bona gazeto kun malpli da kostoj.

*Kaiserslautern: Japana Ghardeno /  
Kaiserslautern: Japanischer Garten*

*Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj landaj ligoj*: La jarĉefkunveno decidis plialtigon de la membrokotizo. Plue: Kelkaj landaj ligoj jam ne eldonas proprajn informbultenojn, sed aperigas siajn informojn en *Esperanto aktuell*. Estis proponite (sen tio, esti findiskutite), kunigi kelkajn landajn ligojn, por ke administraj kostoj povu esti ŝparataj. – Andreas